

APRILLO 2008



MIRMEKOBO

MEDIO

## Sunenergi-paneloj

de Donald Broadribb



Sunenergi-paneloj instalitaj sur domtegmento.

Nuntempe la baldaŭa krizo rilate al la provizado de elektro estas multe diskutata.

Jam de pli ol cent dudek jaroj, tre primitiva sistemo estas kutime uzata por provizi elektron al la publiko. Oni bruligas karbon por boligi akvon, kaj la akvovaporo siavice rotaciigas magnetaĵon, el kio rezultas fluo de elektro en alkonektitaj dratoj. Kvankam oni produktis kaj uzas plurajn variantojn de la brulaĵo, la koncepto ke elektro estasproduktebla rekte sen tiaj mekanikaj rimedoj malmulte ĝuis favoron en la komerco, nek en la politiko. Miloj da ministroj gajnas sian vivmonon per minado de karbo. Pro tio, ofte registaroj rezistas anstataŭigi la uzadon de karbo per alia metodo. La plej populare uzata anstataŭigo uzas atomenerĝion, kaj tio estas vaste akceptita metodo en Eŭropo kaj partoj de Usono.

Oni tamen scias ke la kvanto da karbo (aŭ aliaj bruligeblaj substancoj) estas neniel senlima, kaj iam dum la nuna jarcento tia metodo ne plu estos praktika. Aliflanke, la utiligo de atomenerĝio estas relative danĝera: negrave kiom oni sukcesas preventi eksplodojn de la produktaj instalaĵoj, la atomenerĝifontoj restas danĝere radiaktivaj, kaj restos tiaj dum multaj postaj jarcentoj aŭ jarmiloj.

Oni delonge scias ke eblas rekte “konverti” sunradiadon en elektron. Tiucele oni konstruas panelojn el specialaj substancoj. Kiam la suno radias sur tiujn panelojn, elektro aŭtomate rezultas. La elektro estas “rekta kurento”, kiun oni facile ŝanĝas en “alternantan kurenton”, kiun oni povas per dratoj konduki multajn kilometrojn por utiligo en domoj, fabrikoj, kc. Plejparte registaroj ignoras la valoron de utiligado de sunenerĝi-paneloj, ĉefe ĉar estas multekoste ilin fabriki sufiĉakvante por provizi la elektron bezonatan de tuta komunumo.

Individuaj familioj kaj komercaj entreprenoj tamen povas *mem* instali tiajn panelojn, kaj tiel produkti por sia uzo la kvanton da elektro bezonata. Ekonomie, bona rezulto estas ke post la instalaĵoj de la paneloj, ne necesas pagi elektrokostojn. La elektro estas senkosta. Kaj la malavantaĝoj de la tradicia bruligo-sistemo mankas: toksa fumo mankas, ne necesas elfosi karbon aŭ akiri aliajn brulaĵojn. La suma kosto en, eble, dekjara periodo estas malpli granda por la sunenerĝipanela sistemo ol por la tradicia bruligo-sistemo.

Evidenta malavantaĝo de la panelsistemo estas ke la paneloj ja ne provizas elektron dum la senlumaj horoj, t.e. la nokto. Kvankam la kvanto da elektro bezona por tipa familio estas malmulta dumnokte, tamen ekzistas bezono.

Provizore, la praktiko povas solvi tiun dilemon: nuntempe estas preskaŭ tute nekredeble ke la socio tute rezignos je la tradiciaj elektroproduktaj metodoj. Hejmo uzanta sunenergipanelojn povas facile produkti multe pli da elektro ol ĝi mem bezonas, kaj transsendi la surplusan elektron en la komunumajn elektrolineojn; dum la nokto la hejmo prenas el tiu komunuma elektrolinearo tiom da elektro kiom ĝi bezonas. Kaj facilas kalkuli kiom da elektro estas produktenda dum tuta jaro per sunenergiaj paneloj por ke la tiel produktata elektro egaligu la kvanton bezonan por la sensunlumaj periodoj.

Rimedo por konservi produktitan elektron por uzo dum la nokto ankaŭ, teorie, eblas por individuaj hejmoj, sed ankoraŭ ne estas sufiĉe ellaboritaj por esti praktikaj nunmomente. Ke ili ja estos praktikaj post eble dek aŭ dudek jaroj ŝajnas certe; intertempe oni povas uzi la kompromison priskribitan en la supra alineo.

La nacia registaro aŭstralia, kvankam ŝajne preskaŭ neniu scias tion, pretas subvencii la instaladon de sunenergipaneloj en privataj hejmoj. Ĝi pagas proksimume duonon de la suma kosto (la detaloj varias depende de ĉu oni loĝas en urbo aŭ en la kamparo).

Ĉar mia fratino en Usono, mortinta pasintajare, testamentis al mi neatenditan sumon da mono, mi kaj mia edzino decidis instaligi 80 tiajn panelojn sur la tegmento de nia domo. Ni ne anticipas lukri monon per vendo de surplusa elektro. Verŝajne tio ne okazos. Sed ni almenaŭ povas senti ke ni individue faris ion praktikan, kaj siamaniere valoran, por helpi la sanon de la planedo. La elspezo de ĉ. \$Aŭs40 000, mono testamentita al mi de mia fratino, espereble montriĝos saĝa...

# MEDITADO

## Ta Ke Ti Na

de Franciska Toubale

Vi eble apartenas al tiu generacio, kiu estis edukita laŭ la frapfrazoj “Kie estas volo, estas rimedo”, “Neniu peno, neniu gajno”, aŭ laŭ la franca esprimo “ submetu la maŝinon” (maŝino en tiu kazo signifas la korpon kaj la menson), kaj konscias ke tiu metodo, kiu konsistas en superregado de sentoj kaj emocioj, ne estas kontentiga kaj naskas tension kaj malekvilibron. Renkonti la metodon *ta ke ti na* estis por mi liberige.

Ĝi estas tutisma klareca procedo kaj tute nova maniero sperti kaj kompreni ritmon. Ĝia celo estas faciligi la lernadon de ritmoj en muziko de iu ajn stilo. Aŭstria komponisto kaj majstro pri perkutinstrumentoj, Reinhard Flatischler, kiu naskiĝis en Vieno en 1950, ĝin enkondukis antaŭ trideko da jaroj. Neŭrologia esploro eltrovis kiel la ritmoj kaj movoj impresas la kortekson, sed miaj sciencaj konoj estas tro bazaj por ke mi povu klarigi la fenomenon. Same kiel ŝoforo, kiu povas perfekte stiri aŭtomobilon sen scii kio estas sub la kapoto, mi priskribos tiun metodon tia, kia mi ĝin spertis.

La renkonto daŭris tri tagojn. La etoso memorigis min pri festoj de tiel nomataj primitivaj popoloj, kiuj kuniĝas por celebri naturan fenomenon kiel sezonon per muziko kaj dancoj dum pluraj tagoj. La partoprenantoj staris en cirklo ĉirkaŭ granda ĉambro, dum Reinhard kaj helpantino Cornelia staris en la mezo. Cornelia frapis basan tamburon el Brazilo, nomita *surdo* Laŭ la instrukcioj de Reinhard ni ripetadis la samajn tri silabojn *Ga Ma La*, poste li aldonis ritmon, *Ga MA La*. Iom post iom la piedoj sekvis la ritmon per flankaj paŝoj, poste per manoj ni aldonis gestojn, finfine la du manoj faris diferencon geston. Reinhard tiam komencis paroli kaj paŝi, uzante aliajn ritmojn. Imagu kiom malfacile estas sukcesi plenumi la tuton senerare. La energio el la grupo kaj la senĉesa batado de la tamburo helpas, Foje oni sentas kvazaŭ ektrance. Oni perdas la ritmon, ĝin retrovas. Kiam oni ne plu luktas kun la volo nepre sukcesi, la korpo mem absorbas la ritmon, oni tiam sentas sin kiel parton de granda movo.

De tempo al tempo la granda grupo dividiĝas en grupetoj de du aŭ tri personoj por fari ekzercojn, kiuj helpas malstreĉiĝi. Fakte la sekreto estas sama kiel en la ĉiutaga vivo: akcepti la malsukcesojn, rekoni ilin sen senti nervoziĝon, koleron aŭ frustron. Kvankam la celo de la metodo estas faciligi la lernadon aparte de perkutinstrumentoj kaj la uzon de la voĉo por esprimi siajn sentojn, ĝi alportas ankaŭ internan trankvilon kaj pro tio estas uzata ankaŭ por malliberuloj, malsanuloj, artistoj kiel dancistoj aŭ aktoroj.

Mi tre ĝojas ke mi loĝas en Melburno, kie eblas sperti tiujn nekutimajn spertojn. □

# LA MONDO PER BILDOJ

## Arka Boreala Aŭroro



en Alasko, 2008



en Alasko



en Alasko



če Palmer, Alasko



Finlando, 2003



en Finlando



êe Insulo Kvaloya, Norvegio



êeltzehoa, Germanio, 2003





če Longyearbyen, Norvegio



Montana, 2002



North Carolina (Usono) 2003



North Dakota (Usono) 1998



North Dakota (Usono) 2004



Toronto (Kanado) 2000



Fotita el spacveturilo, 2006

# LITERATURAĴO

## La Averta

de Trevor Steele

(ĉapitro el nova romano ankoraŭ neeldonita)

Retrospekte ni devas konfesi, ke la nazioj kombinis ruzon kaj brutalecon en ege efika maniero. Hitler tre bone sciis, kion li faras, kiam li insistis, ke la nazioj en la kabineto transprenu la policon kaj en la tuta lando kaj aparte en Prusio. Se policêfo estas sufiĉe fortvola kaj senskrupula, kaj se li havas la aprobon de sia propra estro, la kanceliero, li povas fari kion li volas. Kiu povas polici policiston?

Hermann Goering, tiu iama piloto kun la talimezuro de elefanto, ĵetis sin tuj en la taskon detrui ĉian oponadon en la lando, kaj unuavice en Prusio. Li unue sendis SA-anojn kiel “honorajn policistojn” okupacii la ĉefsidejojn de kelkaj opoziciaj grupoj — komunistoj estis la unuaj viktimoj. Poste liaj huliganoj okupaciis pli kaj pli da domoj de partioj kaj sindikatoj, kaj la nombro da organizeblaj malamikoj pli kaj pli ŝrumpis. Kaj kompreneble la SA-anoj kaj policistoj ne nur okupaciis domojn — ili fortrenis ankaŭ homojn kaj enkarcerigis, kaj ne malofte murdis survoje. Neniam rezisto povis esti organizita.

Pri la gazetaro ili same lerte agis. Unue ili malpermesis ĵurnalojn, kiuj kritikis iun ajn sekcion de la nova registaro, ĉu Hitler, ĉu Papen, ĉu Hugenberg, ĉu Stahlhelm. Tiel ili maskis la fakton, ke ili celas fine kompletan kaj nedividitan regadon por la nazia partio. Kaj alia ruzaĵo estis, ke ĝenerale ili ne tuj malpermesis ĵurnalon por ĉiam. La malpermeso temis pri periodo de unu semajno, tri tagoj, aŭ eble du semajnoj. La redaktistoj kaj posedantoj de la ĵurnaloj, anstataŭ amase ribeli, provis certigi, ke post la fino de la malpermeso la enhavo de la periodaĵo estos akceptebla al la registaro. Kompreneble la sorto de ĉiu ajn iomete sendependa ĵurnalo aŭ revuo estis permanenta malapero, sed provizore la ĵurnalistoj esperis, ke temas nur pri transira problemo iel solvebla per doloraj kompromisoj.

Tiu taktiko hipnotis ankaŭ la aliajn ministrojn de la Hitler-Papen registaro: ili vidis, ke la hakilo falas sur evidentajn oponulojn, kaj ili supozis – aŭ esperis – ke ili mem restos imunaj kontraŭ atako. Ni nun scias, ke ankaŭ ili baldaŭ foriros trompitaj.

La lastaj numeroj de *Novaj Folioj* ne plu menciis “Progresojn” kaj “Regresojn”, sed aperis rubriko kun la titolo “Perdoj”, kiu vekis memoraĵojn pri soldatoj mortigitaj dum la lasta semajno de milito. Kaj la perdolisto estis ĉiam pli longa: arestoj, maldungoj, malpermesoj centope.

Kurt kaj ni aliaj NF-anoj nun kredis, ke la sola savo restos en ĝenerala striko de la laboristoj, kaj ni senĉese apelaciis al la du grandaj maldekstraj partioj forgesi siajn konfliktojn kaj kunlabori. Kiel ni nun scias, estis kelkaj disaj provoj de laboristoj mem organizi strikon, sed la partiestroj ne gvidis tiucelen. La proletaro de Germanio, plurdekmiliona amaso, sed ne unuiĝinta kaj demoralizita de kripliga senlaboreco, ŝafidosimile kapitulacis al la kontraŭrevolucio.

Se la laboristoj ne rezistis, almenaŭ kelkaj ĵurnalistoj provis ion fari. La 17-an de februaro la berlina filio de la Asocio por Protekti Verkistojn organizis protestkunvenon en la antaŭurbo Teltow, kaj Kurt Lenz estis invitita fari la ĉefparoladon. La salono estis tute plena, multaj aŭskultantoj devis stari. La tuta stabo de NF ĉeestis, kaj mi diligente stenografis. La oficiala celo de la kunveno estis levi proteston kontraŭ la subpremado de opiniesprimo, kaj ni naive esperis fajrigi grandajn partojn de la loĝantaro kaj kontakti ankaŭ la publikon de aliaj landoj.

Mia amiko Kurt neniam eĉ provis oratori. Ĉia tia aktorado estis fremda al li. Sed pro lia honora reputacio kiel viktimo de maljusteco li estis la fokuso de ĉies atento. Li parolis malrapide, apenaŭ balbutante, klare kaj logike. Mi redonas parton de mia stenografajo.

*Mi apartenas al neniu partio. Mi batalis kontraŭ ĉiuj flankoj, plej ofte la dekstra, sed ankaŭ la maldekstra. Sed hodiaŭ ni sciu, ke maldekstre de ni estas nur alianculoj. La flago, kiun mi agnoskas, estas ne plu la nigra-ruĝa-ora de tiu ĉi degenerinta respubliko, sed la standardo de la unuiĝinta kontraŭfaŝista movado. Kaj mi, pacifisto, nun aliĝas al la granda armeo, kiu batalas por libereco.*

Antaŭ ol Kurt finis sian paroladon, Erich Mühsam eniris la salonon kaj iris al la surpodia tablo kun presaĵo en la manoj. La lastaj vortoj de Kurt estis urĝega peto al la maldekstruloj unuiĝi. Neniu el ni povis ne senti kortuŝiĝon pro la sincereco de tiu kuraĝa kaj nesanaspekta viro. Post la aplaŭdo por Kurt, Mühsam enmanigis la paperon al la prezidanto Ernst Toller kaj evidente flustris, ke io estas transdonenda.

Toller ŝajnis eĉ tremi. Li ekstaris kaj post momento levis la brakojn, ke ni silentu. Neniu sono aŭdeblis en tiu plenplena salono.

“Goering ĵus informis, ke li persone protektos kontraŭ eventualaj plendoj ĉiun naci-sentan homon, kiu dum sia deĵoro pafos. Li aldonis, ke liaj homoj ne ŝparu kuglojn. Pli bone, li diris, ke kelkaj senkulpuloj mortu, ol ke kelkaj kulpuloj eskapu.

“Gesinjoroj, ni ĉiuj komprenas la signifon de tiuj vortoj, ĉu ne? Ne plu estos



eblo jure movi kontraŭ arbitraj krimoj de la registaro. Ĉar estas sendube spionoj de la registaro ankaŭ en tiu ĉi ĉambro, ni esperu, ke tiuj naci-sentaj pafoj ne ektondros ĉi tie ...”

Ĝuste en tiu momento granda pordo flanke de la salono krake malfermiĝis. Ni ĉiuj instinkte pretiĝis por salti ien, for de la atendataj kugloj. Fakte eniris la ĉambron nur grupeto, kiu tro malfrue atingis la salonon.

Ĝus konsciiĝis en mi en mia svisa ekzilo, ke neniuj el la homoj, kiuj havis iom gravan rolon dum tiu kunveno, estas nun liberaj. Kiom el ili mortis, neniuj scias.

La postan tagon Kurt estis pala kaj nervoza. Mi sciis post multjara sperto, ke li baldaŭ estos tiel malforta, ke li devos enlitiĝi. Sed li provis labori, kvankam la vortoj ne facile fluis el lia rotacianta skribilo.

Walter Mehring, unu el niaj plej spritaj kanzonistoj, eniris iom post la naŭa horo, kaj petis min tuj informi Kurt, ke necesas interparoli. Kurt invitis min partopreni, kaj ni tri provis sidi en lia ĉambreto.

Walter rakontis, ke frumatene li estis hejme, kiam nekonata sinjoro frapis ĉe la pordo. Li sin prezentis kiel oficisto de la ministerio pri eksterlandaj aferoj.

“S-ro Mehring, vi ofte ferias en Francio, ĉu ne?”

“Nu jes ... Ĉu tio estas krimo?” respondis Walter, nesciante kien la konversacio stiriĝas.

“Krimo? Ne. Sed estus bona ideo veturi tuj al Parizo.”

“Kial?”

“Amika konsilo: iru tuj. Post kelkaj tagoj okazos, hm, ni diru, provoka ago.”

“Kiu provokos kiun?”

“Kredu min, mi ne amas miajn novajn ĉefojn, la naziojn. Mi ne volas, ke tro da homoj suferu. Ili provokos. Pli mi ne diras al vi nun. Sed sendube estos miloj da arestoj post la provoko.”

Walter Mehring rigardis la nekonaton kaj juĝis lian vizaĝon honesta. “Ĉu ne estas danĝere por vi, ke vi diras tion al mi?”

“Jes, sed mi scias, ke vi ne denuncos min. Vidu, dum kelkaj jaroj mi legas Novajn Foliojn kaj mi baze konsentas kun viaj politikaj vidpunktoj. Viajn artikolojn kaj kanzonojn mi ĉiam legas kun plezuro. Mi scias, ke vi estas deca homo, kaj mi volas helpi.”

“Mi kredas vin kaj dankas. Sed diru, ĉu via averto pravas ankaŭ pri Kurt Lenz?”

Li parolis tre emfaze: “Pri Kurt Lenz antaŭ ĉiuj. Hellmut von Gerlach estos alia arestito, se li ne foriros. Mian nomon mi ne diros al vi, malgraŭ ĉio. Sed mi

petas vin foriri el Germanio.”

Kaj la sinjoro rigide kliniĝis, skuis la manon de Walter, kaj foriris.

Kiam Walter finis sian rakonton, Kurt silentis, sed liaj manoj iom tremetis. Subite Hellmut von Gerlach montris sian vizaĝon ĉe la pordo. Kurt gestis al li alproksimiĝi, sed la ĉambro ne povis ampleksi nin ĉiujn.

“Erich, v-voku ĉiujn k-kamaradojn ariĝi en la a-akceptoĉambro,” Kurt petis.

Estis multaj palaj vizaĝoj en la akceptejo, dum Walter parolis. Kiam li finis, iu demandis, “Do ĉu ni tuj foriru? Pri kia provoko temas?”

“Mia informanto ne volis doni detalojn, sed li faris al mi fidindan impreson. Kaj mi decidis, ke mi ja vizitos Parizon.”

“Mi havas amikojn en Nederlando,” diris alia kamarado. “Eble estas tempo, ke mi vizitu ilin.”

Ekscitataj voĉoj leviĝis. Unu post alia pluraj kamaradoj decidis, ke estus saĝe forlasi Germanion malgraŭ la necerteco pri tiu “provoko”.

Dume Kurt staris silenta kaj videble malsaniĝanta. Dum breĉo en la interjekcioj mi demandis, “Kurt, ĉu ankaŭ vi?”

“M-mi ... mi ne. Al ĉ-ĉiuj, kiuj foriros, mi d-deziras bonŝancon. S-sed mi devas paroli kun Jacob S-Siegfriedsohn. Mi sentas respondecon p-pri lia revuo.”

“Kurt, ni ĉiuj amas NF, sed vi scias, ĉu ne, ke ĝi estos malpermesita tre baldaŭ,” diris Walter Mehring. “Ĝi ne estas savebla. Parolu kun Jacob, kaj veturu tuj pluen. Aŭ kunprenu vian familion, aŭ aranĝu, ke Paula kaj Rosi sekvu vin.”

Nur tiam mi konsciis pri la bela, maltrankvila vizaĝo de Gloria Bleibtreu. Kiel ŝi reagos?

Gloria aliris Kurt kaj diris, “Nun la ĉefa afero estas savi vin, Kurt. Kion la nazioj farus al vi, mi ne volas imagi. Iru tuj post via konversacio kun Jacob.” Ŝi glutis kaj diris, “Se vi volas, mi helpos viajn edzinon kaj filinon aranĝi sian fuĝon.”

Kurt luktis en si mem. Oni devigis lin fari paroladeton fremdan al lia sobra kutima konversacia vortstoko. “Geamikoj ... se ni ĉ-ĉiuj forkuros ... la b-batalo certe estos p-perdita. Temas ne nur pri nia l-libereco, sed pri la s-sorto de nia tuta p-popolo. S-se ni estos en alia l-lando, ni f-fordonos la rajton p-partopreni en la l-lukto. La n-nuna registaro e-estas certe la plej senkompata kaj k-krimula en la h-historio de nia G-Germanio, sed eble ĝi falos b-baldaŭ. Ĝi d-devos fali, aŭ la s-situacio estos k-koŝmara. Por faligi ĝin m-mi devos resti ĉ-ĉe mia posteno. S-se mi fuĝus, Hugenberg kaj Hitler r-ridetus: nu, l-li ne plu ion s-signifas.”

La malsanulo rektigis sian iom kurban dorson kaj diris, malrapide kaj

senbalbute: “Se mi restos, mi estos dorno en ilia karno.”

Li lasis fali la kapon dum kelkaj sekundoj, kaj ĉiuj sciis, ke nun venos signifoplena frazo. Sen patoso Kurt diris, malrapide kaj sen balbuti, "Eble Kant<sup>1</sup> tro influas min ... sed mi devas agi, kvazaŭ ĉio dependus de mi."

La paroladeto finiĝis, sed ĉiuj staris silente, kvazaŭ atendante daŭrigon. Do Kurt signalis la finon de la kunestado kaj diris, “Mi iras nun p-paroli kun Jacob.”

Hellmut von Gerlach diris, “Kurt, via decido estas ĝusta. Ankaŭ mi restos.”

“Ĉu mi telefonu taksiservon?” mi demandis.

“Jes, mi p-petas.”

□

---

<sup>1</sup> Immanuel Kant, 1724 – 1804, tre fama filozofo.

## VIDPUNKTO

# Kial mi estas vegetarano?

de Bob Felby

Jam ekde mia naskiĝo mi amas bestojn. Mi memoras, kiam mi estis ankoraŭ nur infano ludanta kun miaj amikoj. Tiam mi diris al ili: “Faru bonon al la bestoj, iam ankaŭ ni estis bestoj. Ni, la animoj, iras de unu korpo post alia. Se ni bone kondutas, ni post la forpaso de nia fizika korpo ricevos alian, iom pli bonan fizikan korpon. Se ni malbone kondutas, ni ricevos malpli bonan korpon.”

Mi ankoraŭ memoras la ridegon de miaj amikoj. Precipe kiam mi menciis la ratojn. Neniu el ili komprenis min. Mi fariĝis tre malfeliĉa, sed komprenis, ke la vivo ankoraŭ ne instruis al ili tiom, kiom ĝi jam instruis al mi.

Sed ne nur bestojn oni devas ami. Oni devas ami ankaŭ aliajn “homojn”. Dio ne estas kristano, nek islamano. Li ne rajtigas iun el ni malami la alian. Sed precipe anoj de tiuj du religioj tre ŝatas malami kaj moki unu la alian. Kiel pretekston por malami islamanojn iuj kristanoj citas kelkajn versojn en la Nobla Korano, kiuj diras, ke “oni devas mortigi tiujn, kiujn ne kredas je Alaho”. Tion diras kristanoj montrante, ke ili ne estas veraj kristanoj. Jesuo neniam traktis aliajn “homojn” tiel. La kristanoj plej ofte silentas pri tio, kio estas skribita en la Sankta Biblio. En Eliro, ĉapitro 35, verso 2 estas skribite: “Dum ses tagoj faru laboron, sed la sepa tago estu por vi sankta, sabato de ripozo al la Eternulo; ĉiu, kiu faros en ĝi laboron, estu mortigita.. Mi neniam aŭdis, ke islamano uzis tiun Biblieron kiel pretekston por moki kristanojn. Ĉu vi bone konas vian Biblion? En Levidoj, ĉapitro 24, verso 16 estas skribite: “Kiu insultas la nomon de la Eternulo, tiu estu mortigita; per ŝtonoj mortigu lin la tuta komunumo. Ĉu fremdulo, ĉu indiĝeno, se li blasfemos la nomon de la Eternulo, estu mortigita.”

Laŭ Martinus, la mondkonata filozofo dana, la tiel nomata “homaro” ankoraŭ ne atingis homecon. Mi samopinias kun li. Homoj ne mensogas, trompas, kverelas, batalas kaj mortigas. Homoj ne envias, ĵaluzas, avidas ktp. kaj ili certe ne mortigas tiujn inter ni, kiuj estas iomete malpli evoluintaj.

Ankaŭ la estiminda spirita majstro de hinduismo, ŝrila Prabhupado konsentas kun Martinus. Laŭ li la “homaro” estas nur “dukruraj bestoj”. Ŝajnas al mi, ke homoj ne troviĝas sur tiu ĉi planedo escepte de nur kelkaj enkarniĝintoj inter ni por montri al ni la vojon irendan. Inter tiuj estas Jesuo, pri kiu oni erare diras, ke li manĝis fiŝojn. Ankaŭ Ŝrila Prabhupado kaj Martinus venis por helpi nin. Kompreneble estas ankaŭ multaj aliaj, sed espereble vi, kara leganto, bone komprenas, ke ankaŭ mi estas nur survoje al

homeco, kaj tial ne povas esti ĉioscia.

Iam usona sciencisto montris al mi liniilon. Ĝi estis ordinara 30-centimetra liniilo. Multaj el ni havas tian hejme, ĉu ne? Li klarigis al mi, ke ĉiu milimetro sur la liniilo simbolas milionojn da jaroj. Kaj aldonis li, tiu ĉi liniilo simbolas vivon sur la Tero. La unuajn 27 centimetrojn loĝis tre malaltaj vivuloj, plantoj kaj bestoj sur la Tero. Nur la lastajn 3 centimetrojn loĝas la tiel nomataj “homoj”. Sed ĉar ni tiom longe vivis sub kondiĉoj tre malfavoraj kaj malfacilaj, ni ankoraŭ emas kondukti beste. Supozeble vi ĉiuj povas konsenti kun mi. Do, tio, kion mi diras al vi estas la jena: Ni “homoj” kiel ni preferas nomi nin, prilogois nian planedon milionojn da jaroj en la korpoj de plantoj kaj bestoj. Tio komprenigas kial ni ankoraŭ tendencas kondukti beste. Ni ankoraŭ estas egoismaj, fifieraj kaj militismaj. Bestoj manĝas bestojn, tio estas ilia rajto, ĉar ili estas bestoj. Homoj ne rajtas tion fari, kaj ankaŭ ne volas. Ili estas ja homoj!

Ne nur niaj amasinformiloj, sed ankaŭ niaj registaroj emas heroigi tiujn el ni, kiuj elmontras tiujn negativajn tendencojn. Multaj el ni havas iun talenton, verŝajne ni ĉiuj havas iun aŭ alian talenton, kiun ni tre ŝatas montri al la mondo. Pensu nur pri niaj aktoroj, verkistoj, sciencistoj ktp. Oni traktas ilin kvazaŭ ili estus pli gravaj ol la cetera “homaro”, ĉu ne? Kaj ne nur tiuj, estas multaj aliaj, ekz. rokmuzikantoj kaj rokkantistoj. Ili jam sukcesis konvinki — precipe la junularon, ke ankaŭ ili estas herooj kaj meritas esti traktataj kvazaŭ ili gravus pli ol aliaj. Kaj kion diri pri la multaj reĝoj loĝantaj dise sur la planedo. Ilin oni traktas multe pli bone ol tiuj, kiuj estas multe pli antaŭen irintaj sur la vojo al perfekteco.

Eble ankaŭ tiuj, kiuj iras antaŭ ni sur tiu vojo estas talentaj, sed ne emas fanfaroni pri tio. Ili estas modestaj, humilaj, malfieraj, helpemaj, afablaj kaj ĝentilaj kaj certe ne ambiciaj kaj arogantaj. Ili ne kverelas, batalas kaj certe ne mortigas. Sed ĉu oni traktas ilin, kvazaŭ ili apartenus al la reĝa familio, mi tre dubas tion!

Se vi volas vidi pli da ekzemploj, jen kelkaj: Laŭ la registaroj oni rajtas eniri fremdan landon kaj detrui ĉiujn konstruaĵojn kaj mortigi kiom eble plej multe da “homoj”. Ju pli da “homoj” oni sukcesas mortigi, des pli da medaloj la registaro pendigas sur la heroan bruston. Sed se tiuj samaj “herooj” detruas kaj ŝtelas ion ajn en sia propra lando, aŭ eĉ mortigas siajn samlandanojn, do faras tion, kion la registaro instruis al ili, tiam ili estas punataj. En iuj primitivaj landoj eĉ per mortigo. Tia estas la mondo, en kiu ni vivas.

Multaj “homoj” tre ŝatas tion kaj fieras esti soldatoj batalantaj por sia patrujo forgesante ke “tiu, kiu vivas per la pafilo mortos per la pafilo”. Por mi la tuta mondo estas mia patrujo, kaj mi provas ami ĉiujn “homojn”!

“Homoj” uniformitaj ĝenerale jam perdis sian memstarecon kaj

respektindecon. Iam ankaŭ mi estis uniformita, sed mi estas la escepto al la regulo.

Iam mi promenadis kun mia 6-jara filo sur la palaca placo inter la kvar reĝaj palacoj en la ĉefurbo de Danujo. Tiam subite venis kvar uniformitaj viroj — aŭ ĉu mi diru junuloj. Belege uniformitaj, se oni ion tian povas nomi bela. Ili estis parto de la gvardio de la reĝo. Ili antaŭen marŝis kun tute malplenaj vizaĝesprimoj. Apud ili marŝis alia klaŭno. Evidente li estis ilia kvarestro, tiu, kiu faris la decidojn por ili. Sed por diri la veron, ankaŭ lia vizaĝo havis robotece nenian ajn esprimon. Nu, imagu tion, tiuj kvin “homoj” antaŭen marŝis kvazaŭ iliaj kapoj estus tute malplenaj. Neniu signo de cerbo.

La ĉeflanka klaŭno, la kvarestro, malamike bojis ion nekompreneblan, kaj la aliaj kvar robotoj, aŭ ĉu mi diru “militmaŝinoj”? blinde marŝis rekte antaŭen ne konsiderante junan patron kun eta infano. Necesis ke mi montru iom pli da heroeco ol tiuj kvin dukruraj bestoj. Mi rapide prenis mian knabon, levis lin supren kaj kuris flanken lasante al la gloraj militistoj la vojon de ili erare elektitan. Ĉu necesas aldoni, ke nenio el miaj filoj aliĝis al iu ajn el la mortigemaj armeoj?

Mi estas konvinkita, ke krom tiuj spiritaj gvidantoj, Jesuo, Ŝrila Prahupado kaj Martinus, kiujn mi pli supre menciis, kaj kompreneble ankaŭ iuj aliaj, pri kiuj mi neniam aŭdis, ne troviĝas homoj sur tiu ĉi planedo. Ili devas do loĝi sur alia(j) planedo(j). Neniam okazos tutmonda paco ĉi tie, ĉar la enloĝantoj de nia planedo neniam estos homoj. La senĉesaj militoj atestas pri tio. Ni devas do strebi al perfekteco por ke ni kiom eble plej baldaŭ povu eniri pli bonan planedon kun homoj, kiuj scias ami unu la alian!

Ĉi tie sur la Tero la plej multaj el ni dukruraj bestoj estas konvinkitaj ke bestoj ne havas animon. Ni tute ne komprenas, ke ni estas animoj en la korpoj de dukruraj bestoj. Kiam niaj dukruraj korpoj estos eluzitaj pro tro da viandomanĝado, drogmanĝado, fumado kaj alkoholtrinkado, niaj animoj eniros alian korpon fizikan, korpon kiu pli bone taŭgas por nia plua evoluado. Sed kompreneble korpon, kiu donas al ni pli da facilajoj por plenumi la dezirojn, kiujn ni esprimis dum tiu ĉi vivo. Do, se ni elmontris deziron manĝi tro kaj ĉion, tiam la Providenco donos al ni tian korpon, kiu povas toleri tion. La Providenco amas nin kaj respondas pozitive al niaj preĝoj. Ni fariĝos porko, vivos kiel porko, ĉar ni esprimis deziron vivi kiel porko. Kelkaj el ni fariĝos lupoj ktp. Al ĉiu laŭ lia deziro, ĉu ne? Supozeble mi ne bezonas memorigi vin pri la fina sorto de porko. Sed iuj, feliĉe ne ĉiuj, elektas iri tiun vojon, ĉu ne?

Necesas agi saĝe dum la vivo. Oni diras, ke ni vivas nur unu fojon. Tio estas vera, ĉar la vivo daŭras eterne, sed same kiel ni de tempo al tempo ŝanĝas niajn vestojn, ni ankaŭ de tempo al tempo ŝanĝas niajn korpojn. Preskaŭ ĉiu filozofo

povas tion konfirmi al vi. Ni devas ami unu la alian.

Ĉu vi iam vidis la internon de buĉejo? Tie staras longaj vicoj da bovinoj, aŭ porkoj, aŭ ŝafoj, aŭ kokinoj ktp. ktp. Ili estis breditaj de profitavidaj “homoj” sen kompatato al siaj kunkreitoj. Tiuj mortkondamnitaj kvarkruraj bestoj scias pri sia sorto, ĉar ankaŭ ili, same kiel ni, estas submetitaj al la karmoleĝo, t.e. la samo, kion diris ankaŭ Jesuo: “Kiel vi semas, tiel vi ankaŭ rikoltos”. Tiuj kompatintaj kvarkruruloj subite memoras sian antaŭan vivon, pentas kaj elkrias al la Providenco pri helpo. Sed en la buĉejo estas neniu helpo. Nur kruelaj buĉistoj sen kompatato. Pensante nur pri siaj salajroj ili kruele tranĉas la gorgon de la senhelpaj kvarkruruloj kaj kovras ilin ŝaŭmanta sango. Ili ne scias, ke venontvive estos ilia vico. Iu devos ĉesigi tiun mokon de la Dia volo! Necesas ke tio ĉi ne plu okazu! Diris Ŝrila Prabhupado: “Ne nur la buĉisto estos punata, sed ankaŭ tiu, kiu distranĉas la karnon, kiu vendas ĝin, kiu aĉetas ĝin, kiu preparas ĝin kaj kompreneble tiu, kiu manĝas ĝin.” Pensu pri tio. Min persone naŭzas viando. Bestoj devas vivi same, se ne pli, libere ol ni. Ni ne povas krei beston, almenaŭ ne kvarkrurajn bestojn, do kiu en la universo donas al ni la rajton forpreni de ili la vivon donitan al ili? Certe ne ni!

Sed ne nur tio. Tuj kiam la mortkomdamnito ekscias pri sia baldaŭa morto, ĝia angoro kaŭzas, ke tim- kaj dolorvenenoj estas ellasitaj en la karnon. Tio signifas, ke jam antaŭ la morto de la viktimo, la karno estas venenita, tiu karno, en kiun poste la konsumonto metos siajn dentojn.

Pro la fakto, ke bestoj ofte loĝas tro multaj kune en tro malpuraj kaj nesufiĉe grandaj loĝejoj, ili kompreneble estas malsanaj. Eĉ malsanegaj! Estas strange, ke iu ajn volas manĝi ilin. Eble ili — laŭ iuj — bongustas, sed ili certe ne estas bonaj por la “homa” sano!

Kial ni rifuzas vivadi laŭ la naturo? Fariĝu vegetarano! Bestoj estas kreitaj de la sama, kiu kreis nin. La kreinto ne volas, ke ni detruu Lian kreaĵon! Ni parolas pri tutmonda paco samtempe bredante, mortigante kaj manĝante niajn gefratojn. Estas nia devo protekti la bestojn. Tre malsaĝe estas rompi la naturleĝojn. Vi devos akcepti la konsekvencojn, se vi tion faras. Estas por la “homa” korpo sufiĉe da proteinoj en lakto, grajnoj, faboj kaj nuksoj. Agu home!

□

# FILozOFIO

## Platono pri muziko kaj kantoj

(el Platono: *Pri Leĝoj*)

*[La greka filozofo Platono verkis multajn librojn pri diversaj temoj. Plejparte ili konsistas el literature prezentataj diskutoj. En ĉi tiu ĉerpaĵo el lia lasta granda verko, Pri leĝoj, la sceno estas tia:*

*Kune promenas kaj konversacias nenomita turisto el Ateno, kiu verŝajne reprezentas Platonon mem, akompanata de Klejnio, turisto el Kreto, kaj de Megilo, el Lacedemono (antikva nomo de Sparto). En ĉi tiu parto de la konversacio, parolas nur la Atenano kaj Klejnio. La jaro estas ĉ. 340 a.k.e.<sup>1</sup>]*

Atenano: Nu, mi deziras rememorigi nin pri kia devas esti ĝusta edukado, laŭ nia diskuto... Mi ankaŭ diras ke la unua sento de infano estas perceptoj de plezuro kaj doloro. Tiel la menso unue spertas bonon kaj malbonon. Se oni bonfortune ankaŭ atingas raciecon kaj neŝanceleblan certecon, tio okazas dum oldeco. Perfekta persono posedas ĉiujn ĉi tiujn kaj la ĉirilatajn valoraĵojn. Edukado estas ĉefe, laŭ mi, la akiro de virto fare de infanoj. Plezuro kaj amo kaj doloro kaj malamo radikiĝas en la karaktero antaŭ ol oni kapablas rezonadi. Kiam oni atingas la kapablon rezonadi, tiuj spertoj kombiniĝas kun racio kaj formas taŭgajn inklinojn. Virto estas la kunagordo de ĉiuj emocioj, de plezuroj kaj doloroj, tiel ke oni ĝuste malamas kion oni devus malami, de la komenco ĝis la fino, kaj amas kion oni devus ami. Se vi prenas tiun difinon kaj nomas ĝin “edukado”, laŭ mia opinio vi ĝuste nomas ĝin.

Klejnio: Amiko, ni opinias ke kion vi antaŭe diris kaj kion vi nun diras pri edukado estas prava.

Atenano: Do bone. Sed la ĝusta alproprigo de plezuroj kaj doloroj per edukado multe febliĝas kaj perdiĝas dum la vivo. Tial la dioj, kompatante la suferemon de la homa naturo, aranĝis kompensajn paŭzojn dum pezaj laboroj, per festoj. Ili donis la Muzojn, Apolonon la Muzkondukanton, kaj Dionizon, kiuj ferie festas kun ni. Tiel ni refreŝiĝas kun la dioj per la feria nutrado.

Nun konsideru ĉu aŭ ne pravas ĉi tio, kion oni konstante diras al ni: Oni diras ke junaj estaĵoj ne kapablas kvietigi siajn korpojn kaj voĉojn. Ili konstante serĉas moviĝadi kaj kriadi. Kelkaj saltadas kaj dancadas pro plezuro dum ili ludas, aliaj faras ĉiajn kriojn. Aliaj

---

<sup>1</sup> antaŭ la kristana erao.



bestoj ne komprenas senti ordon kaj malordon en moviĝo — kion ni nomas ritmo kaj harmonio — sed ni ricevis tiun komprenon disde la dioj, kiuj, kiel mi diris, estas niaj kunfestantoj. Ili donis al ni la kapablon plezuriĝi pro ritmeco kaj harmonieco. Per tiu plezuro ili movas kaj ĥorkondukas nin. Kiel ĥoro<sup>1</sup> ni samtempe kantas kaj dancas. Oni nomis tion ĥoro ĉar ĝi plaĉas al la koro. Unue, ĉu ni akceptu tion? Ke edukado originis ĉe la Muzoj kaj Apolono?

Klejnio: Tiel estas.

Atenano: Do ni povas diri ke needukita persono estas “neĥorulo”, kaj ke edukita persono estas “ĥorizita”?

Klejnio: Certe.

Atenano: Ĥora prezento estas kombino de dancado kaj kantado.

Klejnio: Nepre.

Atenano: Do bone edukita persono kapablas bone kanti kaj danci?

Klejnio: Verŝajne.

Atenano: Nun ni ekzamenu kion ni ĵus diris.

Klejnio: Kion?

Atenano: Ni diris “bone kanti”, kaj “bone danci”. Ĉu ni aldonu ankaŭ: “se li faras bonan kanton kaj bonan dancon”?

Klejnio: Ni aldonu tion.

Atenano: Supozu ke unu persono akceptas ke kio estas bona ja estas bona, kaj kio estas malinda ja estas malinda; li ĝuste uzas tiujn vortojn. Supozu ke tiu homo lernis ĥorteknikon kaj muzikon, kaj kapablas kontentige interpreti per siaj korpo kaj voĉo tion kion oni nomas bona. Sed supozu ke li ne sentas plezuron pri kio estas bona, kaj ne malamas nebonaĵojn? Ĉu li estas pli bona ol homo kiu nelerte esprimas sin per korpo kaj voĉo, kaj ne povas fari lertajn konceptojn, sed kiu klare komprenas plezuron kaj doloron ĉar li volonte akceptas ĉion bonan, kaj malakceptas ĉion nebonan?

Klejnio: Ja vere tre granda diferenco, amiko.

Atenano: Nu, se ni tri scias kio estas bona en kantado aŭ dancado, ni ĝuste rekonas edukitan aŭ needukitan personon. Se ni ne scias tion, ni ne povas scii ĉu ekzistas eblo gardi edukon, nek kie trovi ĝin. Ĉu

---

<sup>1</sup> En ĉi tiu parto de sia libro, Platono ĉefe parolas pri publikaj muzikaj prezentaĵoj kiaj okazas dum festivaloj, teatraĵoj, kc. Ĥoro estis regula parto de tiaj prezentaĵoj — kutime kun instrumenta ludado. (Pli-malpli simile al populara muziko nuntempa.)

mi pravas?

Klejnio: Jes, vi pravas.

Atenano: Post tio, ni devas elserĉi kvazaŭ spurhundoj kio estas bonaj dancmovoj, melodio, kanto, danco. Se tio eskapos nin, estos senutile diskuti pri ĝusta edukado, ĉu Helena, ĉu barbara.

Klejnio: Jes.

Atenano: Bone. Kiel ni difinu bonan dancmanieron aŭ melodion? Ĉu tute samaj manieroj kaj sonoj rezultas kiam kuraĝa karaktero spertas suferojn kiel kiam timema karaktero spertas ilin?

Klejnio: Kiel povus esti? Iliaj koloroj malsimilas.

Atenano: Tre bone, amiko. Ekzistas dancmanieroj kaj melodio en muziko; do, ĉar muziko konsistas el ritmo kaj harmonio, ĝi povas esti bela rilate al ritmo kaj harmonio. Sed paroli pri ĝi kiel “koloro bela”, kiel kutimas ĥorinstruistoj, ne estas ĝuste. Nu, ekzistas dancmanieroj kaj melodioj taŭgaj por reprezenti timemulon kaj kuraĝulon, kaj estas taŭge diri ke tiuj de la kuraĝuloj estas belaj kaj tiuj de la timemuloj estas fiaj. Por eviti longan diskuton pri ĉiuj ĉi tiaĵoj, ni simple diru ke virta karaktero aŭ korpo havas ĉiajn bonajn dancmanierojn kaj melodiojn, kaj malvirtaj la malon.

Klejnio: Ni respondas ke via propono estas ĝusta.

Atenano: Do ni daŭrigu: Ĉu ni egale ĝuas ĉiujn partojn de ĉiuj ĥorprezentaĵoj?

Klejnio: Tute ne.

Atenano: Kio erarigas nin? Ĉu kio estas bona ne estas sama por ni ĉiuj? Aŭ ĉu ĝi estas sama, sed ne ŝajnas sama? Neniu dirus ke ĥora reprezento de fiĉo estas pli bela ol reprezento de virto. Aŭ ke li mem ĝuas la dancrezentaĵon de fiĉo sed ke la aliaj preferas la kontraŭan Muzon. La plej multaj personoj diras ke la vera valoro de muziko estas ĝia kapablo plezurigi. Sed estas netolereble malpie diri tion. Verŝajne, tamen, io alia erarigas nin.

Klejnio: Kio?

Atenano: Ĥorprezentoj imitas karakterojn en ĉiaj agadoj kaj eventoj. Kiam rolulo reprezentas karakteron parole aŭ kante aŭ per ia alia ĥora ago, kaj tiu karaktero akordas kun lia propra naturo, aŭ liaj kutimoj, aŭ ambaŭ, li aprobas kaj laŭdas kaj diras ke tiu rolo nepre estas bona. Kiam la rolo malakordas kun lia propra naturo aŭ kutimo aŭ emo, li ne povas aprobi aŭ laŭdi ĝin, do li diras ke la rolkaraktero estas fia. Li povas havi ambivalentan senton, kiam la

rolo reprezentas karakteron kiu akordas kun lia propra naturo sed kontraŭas liajn kutimojn, aŭ inverse. Tiuokaze li diras ke estas plaĉe ludi tiun rolon, sed ke ĝi estas neaprobinda. Kiam ĉeestas aliaj personoj kiujn li respektas, li hontas movi sin kaj kanti kvazaŭ aprobante la rolon; tamen li ĝuas ĝin.

Klejnio: Vi plene pravas.

Atenano: Nu, ĉu oni suferas damaĝon, kiam oni ĝuas malbonon per siaj korpomoviĝoj aŭ melodioj? Kaj ĉu oni spertas pliboniĝon kiam oni plezuriĝas per mala agado?

Klejnio: Verŝajne.

Atenano: Ĉu verŝajne aŭ neeviteble? Kiam oni partoprenas la malbonan karakteron de malbonuloj, ne malamas ĝin, volonte akceptas ĝin, nur lude malaprobas ĝin, kvazaŭ la fienco estas nur sonĝata? Neeviteble ĝuanto transprenas la naturon de tio kion li ĝuas, eĉ se li hontas laŭdi ĝin. Kian pli bonan aŭ malbonan sorton ni povus nomi ol tian neeviteblan asimiliĝon?

Klejnio: Mi kredas ke neniun.

Atenano: Kie la leĝoj pri (a)muza eduko-kaj-ludo estas aŭ estos ĝuste establitaj, ĉu ni opinias ke la poetoj estu plene liberaj? Ke poeto rajtu plezuriĝi per kia ajn ritmo aŭ melodio aŭ teksto? Ke en la ĥoroj li instruu ilin al la infanoj kaj junuloj de bonaj civitanoj, tute sen atenti kian efekton tio faras rilate al virto kaj fienco?

Klejnio: Tio estus sensenca.

Atenano: Sed oni permesas tion preskaŭ ĉie, escepte de en Egiptio.

Klejnio: Do diru al ni kion ordonas la leĝoj en Egiptio.

Atenano: Estas mirinde. Ŝajnas ke jam antaŭ longe oni rekonis la veron kiun ni proklamas nun: ke la junaj civitanoj devas ekzerci sin al bonaj korpomoviĝoj kaj bonaj melodioj. Oni faris liston de kiuj kaj kiaj ili estas, kaj publikigis la liston en la temploj. Pentristoj kaj aliaj personoj kiuj decidis pri kiaj ajn korpomoviĝoj ne rajtis devii de tiu listo. Eĉ nun ili ne rajtas fari novigojn aŭ modifi la tradiciojn, nek en korpomoviĝoj nek en iu arto. Se vi rigardos, vi trovos tie ke la pentraĵoj kaj skulptaĵoj de antaŭ dekmil jaroj — ne nur “deantikve”, sed laŭvorte: dekmil jaroj — ne estis pli bonaj aŭ malpli bonaj ol tiuj produktataj nun; oni uzis la samajn regulojn.

Klejnio: Ja estas mirinde!

Atenano: Eksterordinara atingo de leĝfaristoj kaj de la socio. Vi eble trovas malbonaĵojn alispecajn tie, sed ĉi tiu vero estas atentinda pri arto:

ke ja eblas per leĝoj firme establi nature ĝustan muzikon. Tio estas laboro de dio aŭ dia homo, kaj oni diras tie ke la antikvegaj tradiciaj melodioj estis komponitaj de Izisa. Sekve, kiel mi diris, se oni povas trovi ilian ĝustan naturon, oni devus kuraĝe kodigi ilin per leĝo. Eĉ eblas diri ke la konstanta serĉo por novaj plezuroj aŭ suferoj ne povas detrui la konsekritajn ĥoraĵojn kiujn oni nomas arkaikegaj. Tie ŝajnas ke ĝi tute ne sukcesis detrui ilin, tute male.

Klejnio: Tiel ŝajnas, laŭ via raporto.

Atenano: Ĉu ni kuraĝu diri ke perĥora muziko kaj amuzo estas tia: Ni ĝojas kiam ni kredas ke ĉio estas bona; kaj kiam ni ĝojas, ni kredas ke ĉio estas bona. Ĉu ne?

Klejnio: Vi plene pravas.

Atenano: Kaj kiam ni ĝojas, ni ne povas kvieti.

Klejnio: Tiel estas.

Atenano: Niaj junuloj estas pretaj partopreni en la dancado kaj kantado, sed ni la maljunuloj kredas ke estas pli dece mem nur rigardadi ilin danci kaj ĝui ilian plezuron dum ili ludas kaj festas. Nia vigleco jam forkuris de ni, pro tio ni multe ĝuas konkursojn inter infanoj, kiuj povas plej bone memori nin pri nia propra juneco.

Klejnio: Plene vere.

Atenano: Ĉu, do, ni prave opinius malvera la popularan ideon pri konkursantoj? Oni diras ke plej estiminda kaj premiinda estas tiu persono kiu plej distras kaj plezurigas nin. Ĉar ni povas amuziĝi dum konkursoj, la persono kiu plej amuzas la plej multajn homojn estas honorinda kaj, kiel mi ĵus diris, devas ricevi la premion. Ĉu oni ne prave diras tion, kaj agas konforme?

Klejnio: Verŝajne.

Atenano: Sed, kara amiko, ni ne tro rapide konkludu. Ni ekzameni la detalojn tiel: Supozu ke iu organizus konkurson, sed li ne specifus ke ĝi estu sporta aŭ muzika aŭ ĉevala konkurso. Kaj supozu ke li kunvenigus ĉiujn homojn de la civito, kaj deklarus ke li donos premion. Kiu volas, tiu venu kaj konkursu nur pri plezuro. Kiu plej ĝuigos la rigardantojn, ne gravas kiel, tiu venkos. Li venkos se li estos juĝita la plej sukcesa ĝuiganto inter la konkursantoj. Kio, laŭ nia supozo, rezultos el tiu proklamo?

Klejnio: Kiurilate?

Atenano: Verŝajne unu imitus Homeron kaj deklamus poemojn. Alia kantis citrantre. Alia ludus tragedion. Alia komedion. Ne mirigus se iu

anticipus venki per prezento de marionetoj. Ĉu eblas diri kiu el ili, kaj miloj da aliaj, meritos venki?

Klejnio: Ne eblas respondi. Kiu povus prave respondi sen unue mem aŭdi ĉiun el la konkursantoj?

Atenano: Ĉu vi volas ke mi donu al vi la neeblan respondon?

Klejnio: Nepre.

Atenano: Nu, se la plej malgrandaj infanoj decidus, ili juĝos ke venkis la prezentanto de la marionetoj, ĉu ne?

Klejnio: Sendube.

Atenano: Se la pli grandaj infanoj decidus, ili elektos la komediiston. La edukitaj virinoj kaj la junaj viroj kaj preskaŭ ĉiuj aliaj preferos la tragediiston.

Klejnio: Povas esti.

Atenano: Verŝajne ni la maljunuloj plej volonte aŭskultos deklamanton kiu bele prezentos *Iliadon* kaj *Odiseadon* kaj kelkajn verkojn de Hesiodo, kaj ni nomos lin la senduba venkinto. Do kiu vere venkos? Tion ni devas konsideri, ĉu vi akordas?

Klejnio: Jes.

Atenano: Klare ke mi kaj vi devos diri ke la veraj venkintoj estos juĝitaj de ni olduloj. Ĉar inter ĉiuj metodoj troveblaj en ĉiuj civitoj ĉie, ni supozos ke tiu estas la plej taŭga.

Klejnio: Certe.

Atenano: Do, ĝis tiu punkto mi akordas kun la plej multaj personoj: necesas elekti la artiston kiu plaĉas. Sed ne kiu plaĉas al ĉiu ajn. Necesas elekti la plej belan Muzon kiu distras la plej indajn edukitojn — specife la plej indan, edukitan personon. Tial ni diras ke la juĝisto devas esti induloj, ĉar ili devas esti ne nur saĝaj sed ankaŭ kuraĝaj. Taŭga juĝisto devas elekti ne laŭ la rigardantaro, kies kriado kune kun lia propra maledukiteco superregas lin. Kaj li devas ne facilanime verdikti falsan juĝon, pro siaj malkuraĝo kaj timo. Li ne mensoge juĝu pere de tiu sama buŝo per kiu li alvokis la diojn kiam li entreprenis juĝi. La vero estas ke juĝisto sidas kiel instruisto de la rigardantoj, ne ilia lernanto. Li devas oponi rigardantojn kiuj maldece kaj malĝuste montras plezuron.

Tio estis permesata de la antikva Helena leĝo, malsimile al la nuntempa leĝo de la Sicilianoj kaj Italoj, kiu lasas ke la rigardantoj elektu la venkinton per levo de manoj. Tio koruptis la verkistojn

mem — ili verkas por la koruptita gustumo de la juĝistoj, tiel ke la rigardantoj instruas ilin — kaj ĝi ankaŭ koruptis la gustumon de la rigardantoj. Ili devus progresigi sian gustumon per daŭra aŭskultado al prezento de karakteroj pli altkvalitaj ol iliaj. Per ilia aktuala agado ili spertas la malon. Nu, kiun konkludon ni faru pro nia diskuto? Ni konsideru ĉu ĝi estas tia:

Klejnio: Kia?

Atenano: Ŝajnas al mi ke la diskuto jam la trian aŭ kvaran fojon cirkle reatingis sian komencon: ke edukado konsistas el tiri kaj konduki la infanojn al la ĝustaj principoj esprimitaj de leĝo. Tiuj principoj, siavice, estas proklamitaj kiel vere ĝustaj de la plej kapablaj kaj maljunaj personoj, surbaze de ilia sperto. Edukado devas certigi ke la menso de la infano ne kutimiĝos ĝoji kaj malĝoji kontraŭe al la leĝo kaj al la obeantoj de la leĝo. La infano devas sekvi la obeantojn, kaj ĝoji kaj malĝoji same kiel la maljunuloj. Tiucele ekzistas kantoj, ni nomas ilin “kantoj” ĉar ili “sorĉas”<sup>1</sup> la spiritojn de la infanoj. Ilia plej serioza celo estas la kunakordigo pri kiu ni parolis. Ĉar la junaj spiritoj de infanoj ne povas toleri seriozecon, ili nomiĝas kaj praktikiĝas en la formo de ludoj kaj kantoj.

Estas analogie al malsanuloj kaj malfortuloj: oni provas doni al ili taŭgajn nutraĵojn en la formo de plaĉaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj maltaŭgajn en la formo de malplaĉaj, por ke ili kutimiĝu aprobi la taŭgajn kaj malami la maltaŭgajn. Tute same, la leĝfaristo persvados poetojn — kaj se ne eblas persvadi, do devigos la poetojn — verki per siaj belaj kaj laŭdindaj esprimoj, por ke saĝaj, kuraĝaj, ĉiurilate bonaj viroj estu reprezentataj per ritme kaj harmonie ĝustaj moviĝoj kaj melodioj.

Klejnio: Je Zeŭso, amiko! Ĉu vi imagas ke oni verkas tiel en aliaj civitoj? Laŭ mia scio, oni verkas tiel nur ĉe ni kaj en Lacedemono. La dancado kaj la tuta muziko konstante ŝanĝiĝas — ja ne laŭ leĝoj sed laŭ tute senordaj emoj; plene mankas la stabileco kiun vi atribuis al Egiptio, nenio restas senŝanĝa.

Atenano: Vi tute pravas, Klejnio. Se ŝajnis al vi, kiel vi diras, ke mi parolas kvazaŭ nun okazas tiel, sendube mi malklare esprimis miajn pensojn. Mi ne volis supozigi ke muziko jam estas tia, sed ke ĝi devus esti tia. Neniam estas dolĉe mallaŭdi perversajn kaj tre profunde erarajn agojn, sed kelkfoje estas necese. Ĉar vi akordas kun mi, diru, ĉu ĉi tio okazas ĉe vi kaj ĉe la Lacedemonanoj pli ol

<sup>1</sup> Vortludo en la greka, kie la vortoj “kanto” kaj “sorĉo” tre similas.

ĉe la aliaj Helenoj?

Klejnio: Nepre.

Atenano: Kaj se okazus same ĉe la aliaj? Ĉu ni povas diri ke estus pli bone ol nun?

Klejnio: Multe pli bone, se estus kiel ĉe la Lacedemonoj kaj ĉe ni, kaj se estus kiel vi ĵus diris ke devus esti.

Atenano: Bone. Nun ni interkonsiliĝu. Ĉu via tuta eduka sistemo kaj viaj artoj estas io alia ol ĉi tio?: vi devigas la poetojn diri ke moderema, justa viro sukcesas kaj havas bonan fortunon, negrave ĉu li estas granda kaj forta aŭ malgranda kaj febla, kaj negrave ĉu li estas aŭ ne estas riĉa. Eĉ se li estus pli riĉa ol Kiniro kaj Midaso, se li estus maljusta, li estus malfeliĉa kaj vivus mizere. “Mi nek memorigus,” diras via poeto, kaj tute prave li parolas, “nek mencius viron...kiu farus kaj akirus ĉion nomatan bona nehoneste,” kaj ankaŭ simile “rapide mortigus proksimstarante”, se li estus malhonesta kaj kuraĝus “spekti sangoplenan buĉadon” aŭ “preterrajdus la Nordan Venton de Trakio”,<sup>1</sup> aŭ akirus iun alian tiel nomatan bonaĵon.” Kion oni kutime nomas bonaĵo estas malĝuste nomata. Oni diras ke la ĉefa bono estas sano, dua estas beleco, tria riĉeco, kaj oni nomas milojn da aliaj bonaĵoj — akravido, akraŭdo, kaj ĉiu bona percepta funkcio; esti diktatoro kaj fari kion ajn oni volas; kaj plejsupere, havante ĉion ĉi, kiel eble plej rapide fariĝi senmorta. Vi kaj mi opinias ke ili ĉiuj estas valoregaj por honestuloj, piuloj. Sed por malhonestuloj ili ĉiuj estas malbonegaj, ek de sano. Vido kaj aŭdo kaj percepto kaj vivo mem, eĉ ĉiaj tiel nomataj bonaĵoj, estas malbonegaj dum la tuta eterneco se oni estas tute sen honesteco kaj virto — malpli, se oni kiel eble plej mallonge transvivas. Mi supozas ke vi persvados aŭ devigos viajn poetojn diri tion, same kiel mi, kaj aldoninte ritmojn kaj muzikon eduki viajn infanojn. Ĉu ne? Konsideru. Mi diras klare, ke la tiel nomataj malbonoj estas bonaj por malhonestuloj, malbonaj por honestuloj; kaj la bonaĵoj vere estas bonaj por bonuloj, sed malbonaj por malbonuloj. Kiel mi demandis antaŭe: Mi kaj vi akordas, ĉu ne?

Klejnio: Pri kelkaj partoj jes, pri kelkaj neniel.

Atenano: Nu, se li havas sanon kaj riĉecon kaj estas absoluta diktatoro — kaj mi aldonos por vi enorman forton kaj kuraĝon, ankaŭ senmortecon, kaj li spertos neniun alian el la tiel nomataj

---

<sup>1</sup> Tirteo estis fama pro siaj tre kapablaj militistoj.

malbonoj — krom ke li estas malhonesta kaj aroganta — ĉu povas esti ke mi ne konvinkas vin ke klare li ne estas prospera sed mizera?

Klejnio: Vi plene pravas.

Atenano: Bone. Kion pli mi bezonas diri al vi? Nu, kuraĝa kaj forta kaj bela kaj riĉa, faranta kion ajn li volas dum la tuta vivo, ĉu vi ne opinias ke se li estas malhonesta kaj aroganta, li nepre vivas fie? Aŭ eble vi akordas kun mi, ke li ja vivas fie.

Klejnio: Certe.

Atenano: Do, ĉu malbone?

Klejnio: Ni ne same interakordas.

Atenano: Kaj ĉu do ankaŭ malagrabla kaj senprofite?

Klejnio: Kiel ni povus interakordi kun vi?

Atenano: Vere, kiel? Ŝajnas, amikoj, ke eĉ se dio donus al ni orkestron, ni ne kune kantus. Ĉar mi trovas la aferon pli evidenta ol ke Kreto estas insulo! Kaj se mi estus leĝfaristo, mi provus devigi la poetojn paroli tiel, ankaŭ ĉiujn homojn en la civito. Mi ordonus preskaŭ la plej grandan punon se iu en la regiono proklamus ke kvankam iuj estas malbonuloj ili tamen bone vivas; aŭ ke io estas utila aŭ profitiga sed io alia estas pli honesta; aŭ multo alia dirata nuntempe de la Kretanoj kaj Lakedemonanoj, ŝajne, kiel ankaŭ de la aliaj homoj. Mi persvadus miajn civitanojn paroli alimaniere.



## La Mirmekobo



Kiel besto, la Mirmekobo estas preskaŭ elmortinta en sia indiĝena teritorio. Sed en sia revua formo, ĝi estas internacie havebla per peto aŭ senpaga abono ĉe la URL <mirmekobo@mac.com>, kaj ni esperas ke vi enhejmigos ĝin, nutros ĝin per via legado kaj kontribuo de enhavo, kaj ĝuados ĝin.

Abono al la revuo estas senpaga. Ĉar neniu surpapere presitaj ekzempleroj ekzistas, neniu preskosto ekzistas. Tamen, se vi deziras mem per via komputila presilo presi ekzemplero(j)n, por vi mem aŭ por aliaj, tion vi rajtas fari senpage.

La revueto Mirmekobo estas sendependa, kaj subtenas nenium ismon. Artikolojn povas kontribui iu ajn. Tre bonvenaj estas literaturaĵoj: noveloj, poemoj, prozaĵoj iaspecaj; esprimoj de vidpunkto; historiaĵoj; prezento de interesaj hobiaĵoj; biografiaĵoj, aŭtobiografiaĵoj; legendoj, mitoj... Bildoj, ĉu fotoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu klarigaj, tre bonvenos.

Reklamojn, anonc(et)ojn, propagandon, lingvajn studojn aŭ kritikojn, pornaĵojn, Mirmekobo malakceptas. La redaktoro rajtas akcepti, modifi, aŭ malakcepti ian kontribuaĵon, kiun li opinias malkonforma al la karaktero kaj reputacio de la revueto. Korektojn evidente bezonajn li rajtas fari, konsultinte la verkinton.

© kopirajto apartenas al la verkinto de kontribuaĵo.

Represo de kontribuaĵo estas permesata, se permeson konfirmas ĝia verkinto.

Redaktoro:  
Donald Broadribb

Adreso por ĉiuj komunikaĵoj, por peti ekzempleron, por sendi kontribuaĵon:

[mirmekobo@mac.com](mailto:mirmekobo@mac.com)